

La komenco de la Butonmilito

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 551/87-1, 1982 januaro 21 kaj 23.
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-87/SRI-1982-87-1-551-Claude-kaj-Andree-GACOND-La-komenco-de-la-Butonmilito.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. La pasintan semajnon ni anoncis, ke Kultura Centro Esperantista kunfestos ĉijare la jubileon Louis Pergaud, eldonante en esperanto la plej faman romanon de tiu franclingva verkisto. Temas pri la BUTONMILITO. Kaj ni promesis, ke ni laŭtleĝos al vi erojn el tiu esperantigo, kiun faris Roger Bernard kaj kiu baldaŭ aĉeteblos sub la formo de grandformata kaj bele ilustrita volumo.

A.- Jen ni hodiaŭ laŭtleĝas al vi erojn el la komenco de tiu BUTONMILITO

Cl.- Atendu min, Grangibus! ekkriis Boulot, kun siaj libroj kaj kajeroj subbrake.

A.- Nu, skuiĝu do, mi ne havas tempon por babilaĉi.

Cl.- Io nova?

A.- Povus esti!

Cl.- Nu, venu do!

A.- Kaj kiam Boulot kuniĝis al la du Gibus, siaj klaskamaradoj, ĉiuj tri plu iradis flank-ĉe-flanke direkte al la komunuma lernejdomo.

Cl.- Estis oktobra mateno. Trastrita de dikaj grizaj nuboj la ĉielo limigis la horizonton je la pli proksimaj montetoj, kaj igis la kamparon melankoliplena. La prunarboj estis nudaj, la pomarboj flavaj, la juglandfolioj falis kvazaŭ en ŝveba flugo, unue larĝa kaj malrapida, kiu poste subite sinkis kvazaŭ plongo de nizo, tuj kiam la falangulo iĝis malpli obtuza. La aero estis humida kaj duonvarmeta. Vento tiam-tiam onde kuris. La monotona ronkado de la draŝmaŝinoj aŭdigis sian basan noton, kiu fojfoje longiĝis - ĉe engluto de garbo - en funebra kvazaŭ senespera agonia singulto aŭ dolora ĝemado.

A.- Jen finiĝis somero, naskiĝis aŭtuno.

Cl.- Estis proksimume la oka matene. La suno triste vagadis malantaŭ la nuboj, kaj ia angoro, nepreciza kaj svaga, premis la vilaĝon kaj la kamparon.

A.- La kamplaboroj estis finitaj, kaj, unuopajn aŭ en etaj aroj, jam de du aŭ tri semajnoj oni vidis revenantajn al la lernejo la etajn paŝtistojn kun tanita vizaĝo brunigita de l' suno, densaj haroj strikte tranĉitaj per tiu sama tondilo kutime uzata por la bovoj, katunaj pantalonoj flikitaj kun multaj riparpecoj ĉe la genuoj kaj ĉe la fundo, sed puraj; kaj bluzoj novaj, rigidaj, kiuj perdante la unuajn tagojn sian koloron igis la manojn nigraj kvazaŭ piedoj de bufo, kiel ili diris.

Cl.- Tiun tagon ili trenis sin laŭlonge de la vojoj, kaj iliaj paŝoj ŝajnis pezegaj pro la tuta melankolio de la vetero, sezono kaj pejzaĝo.

A.- Kelkaj tamen, la pli aĝaj, estis jam en la korto de la lernejo kaj vigle inter-paroladis. Oĉjo Simon, la instruisto, kun sia ĉapeto malantaŭen metita kaj okulvitroj sur la frunto super la

okuloj, staris antaŭ la pordo rigardanta al la strato. Li observadis la eniradon, admonis la malfruantajn; kaj kiam ili alvenis unu post la alia, la knabetoj levante sian kaskedon preterpasis lin, trairis la koridoron kaj dissemiĝis en la korton.

A.- La du Gibus, el Vernois, kaj Boulot, kiu kuniĝis al ili survoje, ne ŝajnis premataj de tiu difuza melankolio, kiu igis treniĝantaj la paŝojn de iliaj kamaradoj.

Cl.- Kompare al la antaŭaj tagoj ili fruis kvin minutojn, kaj Oĉjo Simon vidante ilin alveni, rapide eligis sian poŝhorloĝon, kiun li poste metis al sia orelo por kontroli, ĉu ĝi bone funkcias kaj ĉu li ne preteratentis la fiksitan tempon.

A.- La tri kunuloj eniris rapide, absorbmienne, kaj tuj aliris, malantaŭ la latrinoj, tiun lokon ŝirmatan per la domo de oĉjo Gugu (Auguste), la najbaro, lokon, kie ili retrovis la plej multajn el la pliaĝaj jam alvenintaj.

Cl.- Ĉiuj pridiskutis seriozan aferon.

A.- La alveno de ambaŭ Gibus kaj Boulot ne interrompis la diskutadon; la ĵus venintaj probable jam sciis pri kio temas, malnova afero, certe, kaj ili tuj miksis sin en la konversacion, mem alportante gravajn faktojn kaj argumentojn.

Cl.- Estiĝis silento.

A.- La pliaĝa el la du Gibus, kiun oni nomis Grangibus, por distingi lin de P'tit Gibus aŭ Tigibus, la maŭpli aĝa, tiel ekdiris

Cl.- Jen! Kam ni alvenis, mia frato kaj mi, ĉirkaŭ Ménelots, la Velransaj subite ekstaris apud la marnejo de Jean-Baptiste. Ili tuj alfaŭkis nin, pafis ŝtonojn kaj montris bastonojn. Ili ĵetis al ni nomojn: piĉuloj, kretenoj, ŝtelistoj, porkoj, putraj, kadukaj, merdaj; molkojonaj, kaj...

A.- Molkojonaj? miris Lebrac sulkigante la frunton. Kaj kion vi rebatis ilin al tio?

Cl.- Ĉe tio ni sin eskapiĝis, la frato kaj mi, tial ke ni estis nur du, dum tiuj estis almenaŭ dek kvin, kaj ke ili certe alplatigus nin!

A.- Ili vin alpafis molkojonaj! rediris la dika Camus, videble ŝokita, vundita kaj furioza pro tiu nomaĉo kiu atingis ilin ĉiujn. Ĉar ambaŭ Gibus, ja certe, estis atakataj kaj insultataj nur tial, ke ili apartenas al la komunumo kaj lernejo de Longeverne.

Cl.- Jen, daŭrigis Grangibus, mi nun diras al vi, ke se ni ne estas kretenoj, sentaŭguloj kaj malkuraĝuloj, ni montros ilin, ĉu ni estas molaj kojonoj.

A.- He, kio estas ĝi, molaj kojonoj? demandis Tintin.

Cl.- La Crique pripensis.

A.- Mola kojono... kojonoj, oni ja scias kio estas, ĉu ne, tial ke ĉiu havas da ili, eĉ Miraut el Lisée, kaj liaj similas al senŝelaj kaŝtanoj, sed kojono mola!... kojono mola!...

Cl.- Certe, ke tio signifas, ke ni estas minusuloj, interrompis Tigibus, ĉar hieraŭ vespere, dum mi amuziĝis kun Narcisse, nia muelisto, mi nomis lin molkojona, jes tiel, nur por vidi, kaj mia

patro, kiun mi antaŭe ne vidis, ĝuste tiam pasis, kaj nenion dirante, li alplakis al mi du belajn survangojn. Kaj do...

A.- La argumento estis nediskutebla, kaj tion ĉiu perceptis.

Cl.- Nu, nom' de Di! ni ne gapadu pli longe, ni venĝu nin, jen do! konkludis Lebrac.

A.- Ĉu ankaŭ via ideo, vi aliaj?

Cl.- Forpafiĝu, hej vi, litkakuloj, kriis Boulot al la etaj, kiuj proksimiĝis por aŭskulti.

A.- Unuanime ili aprobis la grandan Lebrac. Tiumomente oĉjo Simon aperis en la pordframo por klakigi la manojn kaj tiel doni la signalon por la enklasiĝo. Ĉiuj, tuj kiam ili vidis lin, impete kuregis al la latrinoj, ĉar oni ĉiam lastminute zorgis pri la higienaj necesoj laŭregulaj kaj naturaj.

Cl.- Kaj la komplotantoj silente viciĝis, kun ŝajne indiferenta mieno, kvazaŭ nenio okazis kaj ili ne prenis, momenton antaŭe, gravan, gravegan decidon.

A.- Dum la klashoroj, en tiu mateno, ne ĉio funkciis glate, kaj la instruisto devis laŭte krei por trudi atentemon al la lernantoj. Ne tial ke ili bruegis, sed ili ĉiuj ŝajnis perdiĝintaj en nuboj kaj restis absolute nekapablaj kompreni la intereson, kiun povas havi por junaj Francoj la historio de la metra sistemo.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond laŭtleĝis al vi la komencon de la romano LA BUTONMILITO, kiun Kultura Centro Esperantista ĉijare eldonos, por festi la jubileon Louis Pergaud. Venontsemajne ni legos al vi, kiel deklariĝis la BUTONMILITO. Ĝis reaŭdo!